# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (947) • 2021 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Baroka portebla skulptaĵo, kiu montras la eniron en Jerusalemo dum Palmofesto. /Muzeo Bode en Berlino.

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Paroladoj en la Agoj de la Apostoloj | 27 |
| Tabelvortoj pri la Agoj de la Apostoloj | 33 |
| Hereza evangelio | 39 |
| Agadoj de fondaĵo 'Zienderogen' en 2020 | 46 |
| Memorvortoj kaj Informe | 47 |
| Kanto: Ne gapu sor'! Nin ĉeas la Sinjor' | 48 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, kiel kutime la printempo kunportas refreŝigajn kaj revivigajn varmon kaj esperon. Ĉi-foje la progreso de vakcinado donas plian esperon, ke ni baldaŭ vidos la finon de la fortaj pro-pandemiaj limigoj.

Mi supozas, ke la plej multaj el ni devis iom ŝanĝi fizikan kunestadon al virtualaj renkontiĝoj. Ni devis ekuzi, aŭ pli multe uzi, apojn kiel Zoom, Skype, Meet, Teams k.s. Tio fakte ebligis nin esplori kaj partopreni forajn kunvenojn.

Ĉu vi spertis ion interesan kaj nekutiman? Ion vi povas rekomendi al aliaj? Raportu en nia gazeto!

En pluraj numeroj de Dia Regno (DR), mi donas retajn ligojn. Eble iom malfacile retajpi ilin. Sed, se vi petas ŝlosilvorton al Fontoj.net, vi povas tie trovi elŝuteblajn Dia Regno-jn kaj facile kopii la ligojn. Petu aktualan ŝlosilvorton ĉe Albrecht Kronenberger:

akr[at]fontoj.net. (atentu: [at] = @)

Korekto: Pasint-numere, sur la fronta paĝo, la familiaj nomoj de la poeto kaj la tradukanto estis fuŝaj pro teknika kaŭzo. Devas esti Inge MÜLLER kaj Siegfried KRÜGER. /Redaktoro

# Paroladoj en la Agoj de la Apostoloj

Prelego dum virtualaj Bibliaj Tagoj la 26an de februaro 2021

Philippe Cousson, FR

La libro, kiel supozigas la titolo, enhavas ĉefe rakontojn, raportojn. Tamen, interne de tiu sinsekvo de diversaj eventoj troviĝas tiuj paroladoj.

En la ĉapitroj 2, 3 kaj 4 estas paroladoj de Petro. La sepa ĉapitro enhavas la paroladon de Stefano. En la ĉapitroj 13, 17, 20, 22, 23 kaj 26 oni trovas paroladojn de Paŭlo. Mi esperas ke vi prenis tempon por legi ilin.

Mi unue rigardos la cirkonstancojn de tiuj paroladoj, poste mi rigardos al kiu publiko ili estis adresataj. Sekve mi analizos iliajn skemojn kaj la reagojn. En ili estas multaj komunaĵoj, kompreneble, sed ankaŭ diferencoj, kiujn ni rigardos. Fine, ni serĉos la dividitan mesaĝon, kaj kion oni povas reteni por ni hodiaŭ kaj por niaj Eklezioj.

## 1. Cirkonstancoj

Agoj 2: Vi ĉiuj konas la rakonton de la Pentekosta tago en Jerusalemo, kio okazis al la disĉiploj kunvenintaj kaj trafitaj de la Sankta Spirito. La evento kaŭzis en la urbo tumulton, surprizon, demandadon. La homoj alkuris la domon kie estis la disĉiploj. Ili aŭdis ilin kaj miris, miregis.

Neordinara okazaĵo ene de la festotagoj en la urbo, ĉiuj volas vidi kaj kompreni.

Agoj 3: Johano kaj Petro iras kiel kutime al la Templo. Ĉe la pordo staras handikapita almozulo. Anstataŭ doni almozon Petro, kun Johano, starigas lin, sanigas lin kaj liberigas lin. Ĉiuj bone konis tiun homon, kiu almozpetis. Ili miris kaj volis kompreni.

Agoj 4: Tiu malsanigo, korpa riparo, kaŭzis tiom da bruo, ke la ĉefoj de la popolo volis kompreni kio okazis. Ili ne povis akcepti ke tio havis rilaton kun Jesuo, krucumita antaŭ kelka tempo. Ili konsistigis kortumon antaŭ kiu la apostoloj devis respondi.

Agoj 7: La Evangelio disvastiĝis, kaj la multaj novaj disĉiploj postulis pli da servoj. Sekve, oni instalis la diakonojn, por servi al la tabloj, ĉefe la forgesitajn greklingvajn vidvinojn. En tiuj ĉapitroj, oni povas konstati, ke tiuj sep diakonoj ne nur servis ĉe la tablo, sed predikis la Evangelion, kun sufiĉe granda efiko. Unu el ili estis sekve arestita, ĉar la Evangelio ĝenas multajn homojn, Oni do kondukis Stefanon al proceso helpe de malveraj atestantoj. Li respondas.

Agoj 13: La Evangelio daŭre disvastiĝas. Saŭlo (de nun nomata Paŭlo) estis sendata por proklami la Evangelion al aliaj lokoj. Li iris kun Barnabas al Kipro, kaj poste al diversaj urboj de nuna Anatolio. En Antioĥia en Pisidio, li estis invitita de la ĉefo de la sinagogo paroli.

Agoj 17: Paŭlo, nun kun Silas, plu vojaĝis kaj predikis kaj konsistigis Eklezioјn. Kutime, li komencis paroli en la sinagogoj. Alveninte en Ateno, post la

paroladoj en la sinagogo, li estis invitita de filozofoj paroli en la areopago, do ekster la kutimaj judaj cirkonstancoj.

Agoj 20: Paŭlo nun vojaĝas al Jerusalemo, antaŭsentante ke tiu estos vojaĝo al la fino. Survoje, li vizitas la Ekleziojn. Lia ŝipo haltas en Mileto, apud Efeso. Li vokas la presbiterojn, la respondeculojn de la Eklezio en Efeso. Li dividas kun ili sian senton kaj transdonas siajn rekomendojn.

Agoj 22: Paŭlo estas denove en la juda tero, Estis stranga situacio. Ĉar Paŭlo estis akuzita ne plu sekvi la leĝon kaj inciti al tio, li do decidis fari solenan ritan promeson al Dio kun 4 aliaj. Kiam li estis en la Templo por tio, pluraj kiuj antaŭe vidis lin en la urbo kun ne-judaj disĉiploj pensis ke li kondukis ilin en la sanktejon kaj akuzis lin. La homamaso volis mortigi lin, sed la romiaj soldatoj eltiris lin. Ili poste konstatis ke li ne estas tiu ribelulo kiel ili pensis. Paŭlo petas paroli al la homamaso, kaj la ĉefkapitano akceptis.

Agoj 23: Por bone kompreni kion riproĉas la Judoj al Paŭlo, la ĉefkapitano kondukis Paŭlon al la sinedrio por klarigo.

Agoj 26: Paŭlo estas en karcero atendante proceson antaŭ la imperiestro en Romo. La nova guberniestro Felikso kaj la reĝo Agripo volis aŭskulti Paŭlon por kompreni kial li estas en tia situacio.

## 2. Adresita publiko

Kiel vi jam konstatis la situacioj estis parte samaj parte malsamaj.

Ni nun atentos pri la adresita publiko. Tiu fakto klarigas la diferencojn inter la diversaj paroladoj.

Agoj 2: La teksto indikas kiu troviĝas en Jerusalemo tiam, por la festo de Ŝavuot (la festo de la Semajnoj), 50 tagoj post Pasko. Temas pri Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo, kaj kelkaj versikloj pli poste oni eĉ havas liston de regionoj. Temas pri religiaj, religiemaj homoj, pilgrimantoj. Kun ili ankaŭ estis Judujanoj kaj Galileanoj, Jerusalemanoj. Ili havas komunan kulturon, la biblian kulturon. Ili havas komunan ritaron, inkluzive la pilgrimadon al la urbo, al la Templo.

Agoj 3: La dua parolado okazas en la Salomona portiko de la Templo. Tie venas fideluloj. Temas denove pri kredantaj Judoj. Ili venis tie pro la kuranta informo pri la resanigo de la almozulo. La homoj miregas, kaj volas kompreni kio okazis. Ili havas la saman komunan biblian kulturon, sed ankaŭ scivolemon pri strangaj aferoj. Ili eble postkuras la mirindaĵojn.

Agoj 4: En tiu ĉi ĉapitro Petro defendas sin antaŭ la Sinedrio. Ĝi konsistas el la ĉefoj de la popolo, la fakuloj pri la Leĝo, la Skribistoj kaj la ĉefpastro. Ili des pli bone konas la Skribon. Tamen ili estas ankaŭ el tiuj kiuj kondamnigis Jesuon de la Romianoj. Ilia demando estas pri aŭtoritato.

Agoj 7: Denove, la publiko estas la sinedrio, do homoj kiuj bone konas la historion de la popolo, sed homoj, kiuj ankaŭ provis prudente agi rilate al la Romianoj por konservi siajn kutimojn kaj religion. La agado de la disĉiploj aperas al ili danĝera rilate tion.

Agoj 13: Oni vidis, ke Paŭlo kaj liaj kunuloj unue iras al la sinagogo por proklami la Evangelion. Tion do ili faris dum

tiu misia vojaĝo, tiam en Antioĥia en Pisidio. Tiuj, kiuj vizitas la sinagogojn en tiu tempo estas Judoj kiuj vivas en la urbo aŭ la ĉirkaŭaĵo kaj "tiuj kiuj timas Dion". Tiuj ĉi lastaj ne estas Judoj, eĉ ne prozelitoj, sed homoj kiuj agnoskas la Dion de la Judoj, pliprofundiĝas en tiu fido, kaj ankaŭ vivas laŭe. Paŭlo distingas la du grupojn en sia apostrofo. Ambaŭ bone konas la Skribon kaj kion ĝi diras.

Ĉiuj ĉi tiuj publikoj havis la saman kulturan kaj religian fonon. Ili komprenis kiam oni parolis al ili pri la bibliaj epizodoj.

Agoj 17: La afero tute malsimilas rilate al la parolado en Ateno. La publiko tiam estas pagana. Temas pri grekaj filozofoj, stoikaj kaj epikuranaj, kaj ankaŭ aliaj el la granda varieco de la greka penso. Al ili ne estas bone konata la juda penso tiutempa, krom kompreneble ke en tiu jam malferma mondo la pripenso transiras de unu al la alia.

Agoj 20: En tiu momento, streĉiga por Paŭlo, okazis la renkontiĝo kun la respondeculoj de la Eklezio en Efeso. Intimeco ligas ilin al la apostolo, intimeco kaj sama konvinko pri Jesuo kaj la Evangelio. Tiam ne estas homamaso, nek iuspeca tribunalo, nur amikoj, fratoj.

Agoj 22: Paŭlo defendas sin antaŭ akuzanta homamaso, ĉiuj Judoj, pli fidelaj ol la plej fidelaj. Ĉu ili estis konvinkeblaj? Oni povas dubi.

Agoj 23: Nun, li pledas antaŭ la sinedrio, la religiaj kaj sociaj ĉefoj. Tamen notinde estas, ke ili estis tre dividitaj, inter fariseoj kaj sadukeoj, do eble ne unuanimaj. Eble ene de tiuj estas luktoj por potenco.

Agoj 26: Ankaŭ tiam, ne estas homamaso antaŭ Paŭlo. Temas pri gravuloj, kiuj havas la povon kondamni aŭ ne kondamni lin. Unu el ili estis la romia prokuroro Festo, la alia estis la juda reĝo Agripo. La unua ne multon konas el la juda kulturo kiam la dua bone konas ĝin. Apud ili estis ankaŭ aliaj gravuloj, la kortego de Agripo, la ĉefkapitanoj, la urbaj eminentuloj,

## 3. Skemoj

Agoj 2: Petro komenciĝas per ligo inter kio ĵus kaŭzis tiun ĉi tumulton en la urbo kaj la diro de la profeto Joel pri la elverŝo de la Spirito. Li poste ligas Jesuon, lian vivon, morton kaj releviĝon al la reĝo David en la 16a psalmo. La disĉiploj estas atestantoj de la releviĝo. Petro pluiras komentante la releviĝon de Jesuo, la Kristo, denove kun ligo al David tiam per la 110a psalmo.

Tie mi notas ke la britaj tradukistoj de nia Nova Testamento interpretis la saman grekan vorton *κυριος* per ĉu *Sinjoro*, ĉu la *Eternulo*. Tio ĉi ne okazas nur ĉi tie sed en multaj aliaj lokoj. Tia tradukado estas malofta inter la multaj tradukoj de la Nova Testamento, ĉar ĝi volas reiri al la hebrea teksto de la psalmo tiam, kiam la teksto de la aŭtoro de la Agoj citas la Septuagintan tekston, do greklingvan.

La konkludo de Petro estas ke Jesuon krucumitan kaj releviĝintan Dio faris Sinjoro kaj Kristo.

Post la unuaj reagoj de la homoj, "Ili estis pikitaj en la koro", Petro proklamis la penton kaj la bapton, kaj sekve la donacon de la Spirito kaj la promeson por tiuj kiuj alvokos Dion.

Miloj akceptis tiun parolon, estis baptitaj kaj aldoniĝis al nombro de la disĉiploj. “Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj.”

Agoj 3: Petro ligas Jesuon al la Dio de la patriarkoj, kaj li riproĉas la Jerusalemanojn ke ili malkonfesis kaj kondamnis ĝuste tiun Jesuon markitan de Dio. Tamen Dio relevis lin, kaj la potenco en lia nomo restarigis la almozulon. Li poste diras ke la suferoj de Jesuo la Kristo estis anoncitaj de la profetoj. Sekve, li alvokas al pento kaj konvertiĝo por forigo de la pekoj. Li mencias denove la profetojn, citas Moseon kaj aludas al Samuel, al Abraham.

Ne estis tempo por la reago de la aŭdantoj, ĉar venis la gardistoj de la Templo kiuj arestis Petron kaj Johanon.

Agoj 4: Petro respondas al la demando de la “regantoj, pliaĝuloj kaj skribistoj”: “per kia potenco aŭ per kia nomo vi faris tion?” Li unue donas fakton: estis farata bonfaro al senfortulo, estis farata resanigo, kaj jes, tio okazis per la nomo de Jesuo, kiun vi krucumis, kaj kiun Dio relevis. Li citas la psalmon 118 por doni la rolon de Jesuo kiel bazangula ŝtono de la savo, la sola.

Du faktoj gvidis la reagon de la aŭskultintoj: la kuraĝo kaj saĝo de la apostoloj kaj la efektiva resanigo de la almozulo. Ĉar ili havas formalan aŭtoritaton, ili malpermesis al apostoloj paroli en la nomo de Jesuo,

Agoj 7 : Stefano longe rediras al la sinedrio, kiu bone konas ĝin, la historion de la popolo kaj de ĝia rilato kun Dio: Abrahamon kaj la promesojn, Egipton kaj Jozefon, Moseon, Davidon kaj la Templon. Pri la Templo, li citas la profeton Jesaja, ke Dio ne loĝas en domo konstruita de homoj. Li poste denuncas la sintenon de la ĉefoj, kaj fine proklamas sian vizion de Dio kaj la Filo de homo apud Dio.

Tio ĉi kaŭzis skandalon, koleron, kriojn, kaj fine lian morton per ŝtonĵetado.

Agoj 13: Paŭlo same kiel Petro kaj Stefano rediras la historion de la rilato de Dio kun la popolo de Izrael. Li tion faras ĝis David kaj tiam saltas ĝis Jesuo kiel ido de David kaj plenumo de la promeso, atestita per la prediko de Johano la Baptisto. La ĉefoj kaj la loĝantoj de Jerusalemo kondamnis lin, transdonis lin al Pilato por morto, sed Dio relevis lin kaj multaj atestantoj vidis lin. Tiu releviĝo estas plenumo de promeso laŭ la 2a psalmo de David. Al la kredanto estas nun la promeso pri pardono de la pekoj, pravigo kiun ne kapablas la leĝo de Moseo.

Post tiu parolado, en la sekvanta sabato, “preskaŭ la tuta urbo kolektiĝis por aŭdi la vorton de Dio”. Tio kaŭzis ĵaluzon de Judoj en la sinagogo kiuj kontraŭdiris Paŭlon. Tiu citante Jesajan montras la universalecon de la Evangelio. Tio provokis ĝojon de la paganoj, de la ne-judoj, kaj laŭdon de ili al Dio. La mesaĝo disvastiĝis kaj samtempe la ĵaluzon kaj persekuton, kaj fine forpelon de la apostoloj.

Agoj 17: Tute alia cirkonstanco, do tute alia parolado. Paŭlo serĉas elementon kulturan por alkroĉi sian mesaĝon. Antaŭ li estas paganoj, filozofoj, intelektuloj. Tiu hoko estis religio, tiu

altaro al nekonata dio. Tiu dio kiun vi adoras kvankam ne konas, tiu estas la kreinto, kiu ne vivas en manfarita templo, ne dependas de la homoj, difinas tempon kaj limojn, volas esti trovata, ĉe la origino de ĉio, ne estas bildigebla. Nun tiu Dio proklamas la neceson de pento, juĝos la mondon per elektita viro kiun kiel garantio li relevis el la mortintoj.

Kvankam la mencio pri releviĝo finis la diskuton certe kun mokoj, kelkaj tamen fariĝis disĉiploj tiam.

Oni tamen devas noti ke en pluraj paganaj mitologioj, releviĝo el la mortintoj okazas. Sed ĉu la Grekoj vere kredis al sia mitologio?

Agoj 20: Paŭlo rememorigas al siaj karuloj lian konduton inter ili, komentas ĝin, lian ateston pri pento antaŭ Dio, pri fido al la Sinjoro Jesuo Kristo, pri la Evangelio de la graco de Dio, pri la tuta intenco de Dio, pri la necesa helpo al la malfortuloj. Li poste donas konsilojn, instrukciojn al la presbiteroj, la respondeculoj de la Eklezio en Efeso. Ili kune preĝis kaj brakumis kaj ploregis pro la disiĝo.

Agoj 22: Antaŭ la popolo, la kolera homamaso, Paŭlo rakontas sian propran sperton, sian fervoron persekuti la disĉiplojn, atestas pri la interveno de Jesuo en lian vivon kaj pri la alvoko kiun li ricevis iri kaj prediki al la nacianoj, esti atestanto.

Tiu lasta vorto finis la paroladon. Ili ne plu volis aŭskulti. La Templo estas por la Judoj. Ne forgesu la kaŭzon de tiu afero, la supozo pri akompano de ne-judoj en la Templon.

Agoj 23: Antaŭ la sinedrio Paŭlo unue sin prezentas kiel bona Judo, sed okazis la interveno de la ĉefpastro kaj la mistrafa reago de Paŭlo. La apudstarantoj informis lin pri tiu mispaŝo lia. Oni ankaŭ povas supozi ke ili rimarkigis al li la konsiston de la sinedrio. Li do uzas tiun komunan kredon kun la Fariseoj pri la releviĝo de la mortintoj.

Agoj 26: Kvankam antaŭ Paŭlo estis pluraj aliaj, li ĉefe celis la reĝon Agripo. Post agnosko de la kono de Agripo pri judaj religiaj aferoj, li komentas sian propran vivon en rilato kun la promeso de Dio al la Patroj, al la patriarkoj. Tiu promeso estas ligita al la releviĝo. Paŭlo unue sentis sin devigata agi kontraŭ la disĉiploj de Jesuo, sed Jesuo mem intervenis en lian vivon kaj faris lin atestanto. Tiu komisio kiun li ricevis estas atesti pri Jesuo, proklami la penton, la pardonon de la pekoj, kaj tio ankaŭ al la nacianoj. Tion poste Paŭlo faris. La mencio pri la releviĝo de Kristo anoncita de la profetoj kaj Moseo kaŭzis ĉe la prokuroro Festo la saman reagon kiel ĉe la Grekoj: “Vi frenezas”. La respondo de Paŭlo estas: “Mi ne frenezas”, kaj tion scias la reĝo Agripo. Agripo preskaŭ konvinkiĝis fariĝi kristano. Paŭlo diris ke tio estus lia deziro, ankaŭ por la aliaj, La aŭskultintoj konsentis ke, se ne estus tiu apelacio al Cezaro, Paŭlo povus esti liberigita.

.... daŭrigota

Mihály Munkácsy (1844-1900):

Kristo antaŭ Pontio Pilato (1881)



Golgota (1884)



# Bibliaj tagoj 2021

## Temo: La Agoj de la Apostoloj



Aŭskultu la registritajn Bibliajn Tagojn, kiuj okazis rete inter la 25an kaj 28an de februaro:

25a februaro: https://tinyurl.com/377rh67s
26a februaro: https://tinyurl.com/n8yx859m
27a februaro: https://tinyurl.com/fh8a8xe5
28a februaro: https://tinyurl.com/v752392s

# Tabelvortoj pri la Agoj de la Apostoloj

## Kiu kiam kie kiel kial verkis la Agojn de la Apostoloj? Prelego dum virtualaj Bibliaj Tagoj en februaro 2021

Wolfram ROHLOFF, DE

Karaj legantoj, tio ĉi estas prilaboro de miaj kontribuoj dum la retaj Bibliaj Tagoj 2021. Sed mi devas komenci kun du avertoj aŭ pardonpetoj:

Unuflanke enestas tro multe da informeroj, eble enuigaj, sed mi ja iel volas almenaŭ mencii la plej gravajn ecojn de la Agoj.

Aliflanke mia enkonduko restas supraĵa, ĉar mankas multaj interesaj informoj pri celo, enhavo, teologio k.t.p. de Luko. Mankas detaloj, kiujn mi dum ne-retaj Bibliaj Tagoj certe volus mencii kaj kun vi kune pristudi. Sed pri tio mi devas ĉi tie rezigni.

La enkonduko en tiu ĉi numero de Dia Regno pritraktas la jenajn punktojn:

- Kiu estis la aŭtoro?
- Kiu estis Luko?
- Kio estas lia nomo?
- Kiu do estis tiu Luko?
- Tamen Luko ne povas esti persona kunlaboranto de Paŭlo
  a) Kiom ofte vojaĝis Paŭlo al Jerusalemo?
  b) La decidoj de la Koncilio Apostola
  c) Ĉu Paŭlo estas Apostolo?
  d) La akra konflikto pri la mosea leĝo

Luko tamen estas lernanto de Paŭlo

En sekvontaj du numeroj mi pritraktos pliajn partojn.

### Kiu estis la aŭtoro?

Mi komence nur mallonge volas mencii, ke Luko influas ĝis hodiaŭ pli ol la aliaj evangliistoj la popularan eklezian kulturon, nian eklezian jaron, vivon kaj niajn plej popularajn festojn:

Nur Luko krom Mateo rakontas pri la naskiĝo de Jesuo. Lia rakonto en ĉapitro 2 fariĝis la kutima kristnaska evangelio:

> *1 Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de la Cezaro Aŭgusto, ke tuta mondo estu registrita. 2 Ĉi tiu estis la unua registrado, farita, kiam Kireno estis reganto de Sirio.*

La Ĉieliraj kaj Pentekostaj eventoj en aliaj evangelioj ne estas menciataj aŭ okazas kvazaŭ kun la paskotago: Mateo silentas pri ambaŭ, nur Mat 28, 16–20 iomete similas al kelkaj elementoj de Ĉieliro; laŭ Joh 20,22 Jesuo jam donis dum paska dimanĉo vespere al la disĉiploj la Sanktan Spiriton; kaj origine Marko finis sian evangelion per la vortoj "*... kaj ili [Maria Magdalena, Maria, la patrino de Jakobo kaj Salome, kiuj vidis la anĝelon en la malplena tombo:] diris nenion al iu, ĉar ili timis.*" (Mar 16,8)

(La versikloj Mar 16, 9–20 estas nur unu el pluraj, poste aldonitaj finoj de la evangelio. Tiuj estas rezumoj, kombinitaj el la rakontoj de la aliaj evangelioj.)

Alivorte: Sen Luko ni nek festus apartan feston de Ĉieliro 40 tagojn, nek Pentekoston 7 semajnojn post Pasko.

Ankaŭ la Lukaj rakontoj pri Maria estis elirpunkto de la kristana honorado de Maria kaj simile la rakonto pri Stefano (Agoj 6–7) subtenis postan honoradon de martiroj kaj sanktuloj.

Mi esperas, ke mi pligrandigos vian soifon mem studadi tiun interesan verkon el la komenca frua kristanismo. Do: *Kiu, kiam, kie, kiel, kial* verkis la Agojn de la Apostoloj?

## Kiu estis Luko?

La Agoj de la Apostoloj kaj la Evangelio laŭ Luko estas "duobla verko" de unu aŭtoro. Luko dediĉis ambaŭ librojn al Teofilo (kies nomo cetere signifas "Di-Amiko"). Mi citas el Luko 1, 1–4:

> *1 Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni, 2 kiel ilin transdonis al ni tiuj, kiuj de la komenco vidis mem kaj estis administrantoj de la vorto, 3 ŝajnis bone ankaŭ al mi, esplorinta ĉion atente de la komenco, skribi en ordo al vi, plej eminenta Teofilo, 4 por ke vi povu scii la certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas instruita.*

La dua libro, do la Agoj, komenciĝas per la vortoj (Agoj 1, 1–2):


> *1 La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio, kion Jesuo komencis fari kaj instrui, 2 ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren, doninte ordonon per la Sankta Spirito al la apostoloj, kiujn li elektis;*

Ankaŭ la sama, altnivela, greka lingvostilo atestas, ke estis unu sama aŭtoro.

## Kio estas lia nomo?

Eble stranga demando, ĉar mi ja ĉi tie jam uzis la personan nomon "Luko". Λουκας, Lukas estas greka versio de la latina nomo Lucanius. La etimologia signifo estas homo el Lukanio, el tiu suda, iam greklingva, parto de Italio apud la moderna urbo Potenza.

Sed ĉiuj aŭtoroj de la kvar novtestamentaj evangelioj ne menciis siajn perso-




Sankta Luko, ilustraĵo el la Evangelio de Sankta Riquier (Evangelio de Karolo la Granda) / 9a jc.

najn nomojn en siaj verkoj. La superskriboj aŭ titoloj, ekzemple Evangelio laŭ Mateo, origine ne apartenis al tiuj verkoj. En manskribitaj kopioj de tiuj verkoj, do en la "manuskriptoj" tiuj superskriboj nur ekaperas ĉirkaŭ la 4a jarcento post Kristo. En pli malnovaj manuskriptoj mankas "[Evangelio] laŭ Luko" respektive "Agoj de la Apostoloj".

Ĉu tio signifas, ke la nomo "Luko" estas eble ne la vera nomo de la aŭtoro?

Ne. Tre verŝajne Lukas estas la vera nomo de la aŭtoro, ĉar se iu elpensintus nomon, li certe uzus alian nomon, faman inter la fruaj kristanoj, por substreki la gravecon de la verko. Oni eble prenus nomon de unu el la 12 disĉiploj de Jesuo aŭ de alia grava persono en la frua kristanismo. Sed neniu Lukas ludis gravan rolon inter ili.

El lia nomo kaj el aliaj detaloj ni povas konkludi, ke li estis pagana, do ne-juda kristano.

## Kiu do estis tiu Luko?

En la jaro 1700 la itala arkivisto *Ludovico Antonio Muratori* trovis en Milano en kodekso (libro) el la 8a jarcento kanonan liston, liston de libroj, kiujn oni en frua kristanismo uzis en la eklezio. Tiu kanona listo ne tute kongruas kun la hodiaŭa kanono. Supozeble ĝi estas traduko de greka originalo el la finaj jardekoj de la dua jarcento post Kristo, cetere en malbona latina lingvo. Tiu teksto prezentas Lukon kunlaboranto de Paulo. Mi citas (laŭ mia traduko) el la tielnomata *Canon Muratori* :

La tria evangelia libro laŭ Luko. Tiu kuracisto post la ĉieliro de Kristo – ĉar Paŭlo lin kiel la skribojn [kelkaj sciencistoj korektis: la vojon] sciantan konsultis – ĝin je sia nomo kaj laŭ sia opinio komponis. La sinjoron tamen ankaŭ li mem ne vidis en karno. Kaj pro tio kaj li tiel, kiel li povis kompreni, komencas ekde la naskiĝo de Johano paroli.

(kun miaj substrekoj)

Troviĝas indikoj en la Nova Testamento, kiuj ŝajnas subteni tiun informon. Trifoje estas menciita iu Luko, sekvanto de Paŭlo:

1. en la Letero al la Koloseanoj 4, 14:
   Salutas vin Luko, la amata kuracisto, kaj Demas.
2. en la Letero al Filemon 23–25:
   Salutas vin Epafras, mia kunmalliberulo en Kristo Jesuo, Marko, Aristarĥo, Demas, Luko, miaj kunlaborantoj. La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via spirito. Amen.
3. en la Dua Letero al Timoteo 4,11:
   Nur Luko estas kun mi. Prenu Markon kaj alkonduku lin kun vi, ĉar li utilas al mi por la servado.

Kelkfoje en la Agoj estas uzata la persona pronomo "ni". Tiel ŝajnas, ke la aŭtoro estis kunvojaĝanto de Paŭlo. Mi citas el la 16a ĉapitro de la Agoj. Atentu la subitan ŝanĝon de "ili" al "ni" dum la rakonto:

*6 Kaj **ili** trairis la Frigian kaj Galatujan regionon, malpermesite de la Sankta Spirito priparoli la vorton en Azio; 7 kaj veninte apud Misia, **ili** klopodis eniri en Bitinion, kaj la*

*Spirito de Jesuo tion ne permesis al **ili**; 8 kaj pasinte preter Misia, **ili** malsupreniris al Troas. 9 Kaj vizio aperis al Paŭlo dum la nokto: viro Makedona staris, kaj petegis lin, dirante: Transpasu al Makedonujo, kaj nin helpu. 10 Kaj post kiam li vidis la vizion, **ni** tuj penis foriri en Makedonujon, konkludinte, ke Dio vokis **nin**, por prediki al ili la evangelion.*

*11 Tial, ekŝipirinte de Troas, **ni** rekte veturis al Samotrake, kaj la sekvantan tagon al Neapolis; ...*

Tiu "ni" uzatas rakontante vojaĝojn de Paŭlo:

– de Troas al Filipi (Agoj 16,10–17)
– de Filipi al Mileto (Agoj 20,5–15)
– de Mileto al Jerusalemo (Agoj 21,1–18)
– de Cezareo al Romo (Agoj 27,1–28,16)

Tamen Luko ne povas esti persona kunlaboranto de Paŭlo, ĉar kelkaj informoj en la Agoj pri la vivo kaj teologio de Paŭlo ne kongruas kun la informoj, kiujn ni havas el la aŭtentaj leteroj de Paŭlo. Jen kvar ekzemploj:

**a) Kiom ofte vojaĝis Paŭlo Jerusalemon?**
Laŭ la Agoj, Paŭlo trifoje vizitis Jerusalemon ĝis al la Koncilio Apostola:

– unuan fojon baldaŭ post sia konvertiĝo apud Damasko, Agoj 9, 23–26:

*23 Kaj post la paso de multaj tagoj, la Judoj kune konsiliĝis, por lin mortigi; 24 sed ilia konspiro sciiĝis al Saŭlo. Kaj ili observadis la pordegojn tage kaj nokte, por lin mortigi; 25 sed liaj disĉiploj prenis lin nokte, kaj mallevis lin tra la urba muro, malsupren lasante lin en korbego. 26 Kaj kiam li venis en **Jerusalemon**, li provis aliĝi al la disĉiploj; kaj ĉiuj lin timis, ne kredante, ke li estas disĉiplo.*

– Duan fojo iam poste Paŭlo kaj Barnabas estis senditaj al la Jerusalema eklezio, Agoj 11,29–30:

*29 Kaj la disĉiploj [el Antioĥio] decidis, ke ĉiu laŭ sia bonstato sendu helpon al la fratoj, kiuj loĝis en Judujo; 30 tion ankaŭ ili faris, sendante al la presbiteroj per la manoj de Barnabas kaj **Saŭlo**.*

– La trian fojon Paŭlo vizitis Jerusalemon okaze de la Koncilio Apostola, Agoj 15, 1–29.

Sed male Paŭlo en sia letero al la Galatoj defendante sian sendependecon substrekas, ke li entute nur dufoje estis en Jerusalemo, Galatoj 1, 18–24 ; 2, 1–2:

*18 Tiam, post **tri jaroj** [post sia konvertiĝo], mi supreniris al **Jerusalem**, por viziti Kefason, kaj mi restis kun li dek kvin tagojn. 19 Sed neniun alian el la apostoloj mi vidis, krom Jakobo, la frato de la Sinjoro. 20 Pri tio, kion mi skribas al vi, jen, antaŭ Dio, mi ne mensogas. 21 Poste mi venis en la regionojn de Sirio kaj Kilikio. 22 Kaj mi ankoraŭ estis vizaĝe nekonata de la eklezioj de Judujo, kiuj estis en Kristo; 23 sed ili nur aŭdis la jenon: Kiu nin iam persekutis, tiu nun predikas la fidon, kiun iam li atakis; 24 kaj ili gloris Dion en mi.*

*2,1 Tiam, post intertempo de dek kvar jaroj, mi denove supreniris* ***al Jerusalem*** *kun Barnabas, kunkondukante ankaŭ Titon. 2 Kaj mi supreniris laŭ Dia malkaŝo; kaj mi prezentis al ili la evangelion, kiun mi predikas inter la nacianoj, sed aparte al la eminentuloj, por ke mi ne estu vane kuranta, aŭ kurinta.*

**b) La decidoj de la Koncilio Apostola**

Laŭ Agoj 15, 22–29 estis interkonsento inter la estroj de la Jerusalema Eklezio kaj Paŭlo, ke la paganaj kristanoj devus sekvi kelkajn ritajn devojn el la juda religio. Sed en siaj leteroj Paŭlo asertas male, ke oni nenion al la paganaj kristanoj ordonis, Galatoj 1, 9–10:

*9 Jakobo kaj Kefas kaj Johano, kiuj ŝajne estis kolonoj, rimarkinte la gracon donitan al mi, donis al mi kaj al Barnabas la dekstrajn manojn de kunuleco, por ke ni iru al la nacianoj, kaj ili al la cirkumcidularo; 10 kondiĉe nur, ke ni memoru la malriĉulojn [do siajn kristanajn gefratojn en Jerusalemo], kion ja mi klopodis jam fari.*

**c) Ĉu Paŭlo estas Apostolo?**

Kristanaj kontraŭuloj de Paŭlo ofte neis, ke li estas Apostolo. Paŭlo defendis sian Apostolecon argumentante ekzemple en sia letero al la Galatoj 1, 1, 1–5:

*1 Paŭlo, apostolo (**ne de homoj, nek per homo, sed per Jesuo Kristo, kaj Dio, la Patro**, kiu levis lin el la mortintoj), 2 kaj ĉiuj fratoj, kiuj estas kun mi, al la eklezioj de Galatujo: 3 Graco al vi kaj paco de Dio, la Patro, kaj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, 4 kiu sin donis pro niaj pekoj, por liberigi nin el la nuna malbona mondo, laŭ la volo de nia Dio kaj Patro; 5 al kiu estu la gloro por ĉiam kaj eterne. Amen.*

Sed male Luko difinas Apostolon okulatestanto de la vivo de Jesuo rakontante la aldonan elekton de la Mattiaso kiel Apostolo (Agoj 1, 21s):

*21 El tiuj viroj do, kiuj nin akompanis dum la **tuta tempo**, en kiu la Sinjoro Jesuo eniris kaj eliris inter ni, 22 komencante **de la bapto de Johano ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren for de ni**, unu devas esti **atestanto kun ni pri lia releviĝo**.*

Ĉu persona kunlaboranto de Paŭlo ne defendus la apostolecon de sia instruisto Paŭlo?

**d) La akra konflikto pri la mosea leĝo**

Paŭlo predikis evangelion liberan de la Mosea Leĝo. Tio kaŭzis akran konflikton inter judaj kristanoj kaj li. Tiu akrega konflikto pri la sen-leĝa evangelio, kiun predikis Paŭlo, estas apenaŭ rimarkebla en la Agoj. Verŝajne ĉar Luko rigardas al tiu konflikto el tempa distanco post la fino de ĝi, do eble en la tria generacio de kristanoj.

Luko tamen estas lernanto de Paŭlo, kaj sekvanto de li kaj de ties teologio. Paŭlo proklamas la senfinan, dian gracon. Kion Paŭlo argumentante en siaj leteroj predikas kaj klarigas, tion Luko klarigas per impresaj rakontoj.

Ekzemple en Luko 23, 42 unu el la kunkrucumitaj petas Jesuon:

*42 ... Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon.*

Jesuo respondas al tiu mortanta krimulo:

*43 ... Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo.*

Jen la senkondiĉa amo kaj graco de Dio al ni pekuloj videblas!

Simile kaj Luko kaj Paŭlo akcentas la socialan respondecon de la kristanoj, la egalvaloron de ĉiuj homoj, eĉ de sklavoj kaj virinoj. Por romianoj la ideo de egalvaloreco de ĉiuj homoj ne estis memkomprenebla. Mi pli poste donos ekzemplon.

.... daŭrigota

---

# Printempa 2021

Věra Ludíková, ĉeĥa poetino,
trad. P. Polnický, CZ

Vintro jam demetas blankan koltukon, suno varmigas anstataŭ mufo. Hontema lando malrapide nudigas sin, sub nebula ombro kvazaŭ hezitus. Antaŭ ol vi esperus, la birdetoj troglodito kun la turdo nur iom timige agordigas voĉetojn, por anonci, ke la printempo estas proksime. Per ĉiuj poreoj tero profunde enspiras kaj akumulas fortojn. Tiom necesas por ni la suno, tiom mankas al ni bonaj informoj, tiom ni bezonas esperon! Longa estas fasto, longa estas atendado ...

La spaco subite plenas pro kaŝita verdaĵo de junaj folietoj, kiom da sableroj surtere, ĝi estas plena de kaŝitaj dimensioj kaj kovritaj komencoj, penetrita de freŝa spiro, plenas de atendado, kantvoĉoj de antusoj kaj merloj des pli resonas kun ĝenerala vekiĝado. Profunde kovrita kredo partumita de kredantoj, ke iam finos la turmento sub la pezeco de la kruco, malfermos mirigajn okulojn super simpla beleco de bluaĵoj, krokusoj kaj sakuroj. Ĉio vekiĝas al vivo, kvazaŭ estus benita el lokoj plejsupraj – sed ĉielo denove nubiĝis kaj silente neĝas ...

Silentiĝinta Golgota ensorbas malesperon de fidelaj plejproksimuloj, lamentadon kaj perfidon, por ke ilin transformigu en mirigan animan forton, ĝis tiam nekonatan. Ĝis tien akompanis Majstron multnombra homamaso kaj larmoj de Patrino, varmegaj kaj senfinaj. Tra optiko de konscia oferto sur kruco disfloros dezertoj ne nur ĉe la monto de Oliveta, atingebla estas espero, ke persona oferto de Via Filo, Sinjoro, fortigos amon, moralajn valoraĵojn kaj homecon en ni. Malgraŭ tio montru al ni, ni petas, al kiu el homoj estas bone kredi, al kiu ni aŭskultu, kiu nin gvidu ...

# Hereza evangelio

Prelegserio de József Farkas, hungara reformita pastoro, aŭtune 1969

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Moto:

> Laŭ liaj samtempuloj Jesuo estis herezulo, nur poste lia instruo fariĝis evangelio. Kiam Luther komencis prediki la nove ekkomprenitan evangelion, oni akuzis lin pri herezo, nur poste lia scio fariĝis reformatora pravo. Kiu kuraĝas hodiaŭ prediki tiun herezan evangelion, kiu morgaŭ fariĝos ĉiutaga pano al kristanoj?

## Sekvi Jesuon

Dum ili vojaĝis, iu diris survoje al li: Mi sekvos vin, kien ajn vi iros. Sed Jesuo diris al li: La vulpoj havas kavernojn kaj la birdoj de l'ĉielo nestojn, sed la homido ne havas, kie meti la kapon. Al alia li diris: Sekvu min. Sed tiu diris: Permesu al mi unue foriri entombigi mian patron. Sed li diris al li: Lasu la mortintojn entombigi siajn mortintojn; sed vi devas iri mesaĝi la Regnon de Dio. Ree alia diris: Mi vin sekvos, Sinjoro. Sed unue permesu al mi adiaŭi miajn samdomanojn. Jesuo diris: Kiu ekmetas la manon sur la plugilon kaj ankoraŭ retrorigardas, tiu ne taŭgas por la Regno de Dio*

Luko 9, 57–60

Je la komenco kristanismo estis tre simpla afero. Inter minimalaj eksteraj kadroj aperis maksimumaj spiritaj fortoj. Poste bedaŭrinde komencis kreski, larĝiĝi la kadro, la organizado, la formo, kaj samtempe pli kaj pli malfortiĝis la spirito. La eklezio alvenis al „pimpa mizero", la eksteraĵoj fariĝis pli kaj pli pimpaj, la enhavo, la esenco malriĉiĝis. Petro kaj Johano post pentekosto iris al la preĝejo de Jerusalemo. Ili trovis tie almozulon, kiu per granda atendado rigardis ilin. Laŭ la Agoj: "*Petro diris: Arĝentaĵon nek oraĵon mi havas, sed kion mi havas, tion mi donas al vi. En la nomo de Jesuo Mesio la Nazareo: ekpaŝu!*" (Agoj 3, 6)

Kaj li ekpaŝis kaj iris kaj gloris Dion. Ni atentu pri la kontrasto: mi ne havas arĝentaĵon aŭ oraĵon, sed en la nomo de

* la bibliaj citaĵoj en la teksto estas laŭ la traduko de G. Berveling.

Jesuo vi ekpaŝu! Antaŭ mil jaroj honesta papo rememorante pri tiu ĉi versiklo diris: “Hodiaŭ ni jam ne povas diri, ke ni ne havas arĝentaĵon kaj oraĵon, sed tion ni vane diras: ekpaŝu!” Tio estas la pimpa mizero de la eklezio, ke la eklezio havas oraĵon kaj arĝentaĵon, sed mankas tiu resaniga potenco, kiun tiatempe ricevis la eklezio de Jesuo. En nia generacio la monda kristanismo transiras signifan ŝanĝon. Komencas forigi tiun pimpaĵon, kaj komencas denove simpliĝi. Ĝis nun kelkaj eklezioj – ne ĉiuj – jam povas diri, ke mi ne havas oraĵon kaj arĝentaĵon. Mi kredas, ke la indulgo de Dio helpos al ni daŭre iri tiun ĉi vojon, ke ni denove povos diri ankaŭ tion: ekpaŝu! La plej gravan signon de la resaniĝo de la eklezio mi vidas en ĝi, ke paliĝas la graveco de la ceremonioj, la dogmoj, kaj pli kaj pli brilas la figuro, la personeco, la gloro de Jesuo. Sur tiu ĉi vojo povos renoviĝi la eklezio. Se la hieraŭan kristanismon karakterizis, ke devis funkciigi grandan religian entreprenon, la morgaŭajn kristanojn karakterizos, ke homoj sekvas ĉiutagan vojon de Jesuo. Laŭ mi tio estas la perspektivo: paliĝas, malfortiĝas la graveco de la organizacio, la rito kaj la litero sed la vivanta Jesuo brilos.

Se tiel estos, tiam valoras unu vesperon la temo, *sekvi Jesuon*. Kiel hodiaŭ oni devas sekvi Jesuon? Ne estas facile trovi la respondon al tiu ĉi demando, precipe ĉar okazis kaj okazas multaj misuzoj per la alvoko sekvi Jesuon. Multaj sentas ankaŭ hodiaŭ, ke estas potenco en tiu ĉi nomo: Jesuo Kristo. Pro tio multaj skribas sur sian flagon la nomon de Jesuo Kristo kaj flirtigas sian flagon dirante: Vi venu tien ĉi! Ĉi tie estas Kristo! Tio okazas, ke la homo ne rezignas siajn pensojn kaj volojn, kaj ne per la gvidado de Kristo volas antaŭen iri, sed volas “kapti” Kriston, enmanipuligi Kriston en siajn proprajn celojn kaj pensojn, kaj menciadante Lian nomon volas atingi siajn celojn. Ofte tio okazas en kaj ekster la eklezio, kaj pro tio la situacio fariĝis ĥaosa kaj homoj singarde devas serĉi, kion signifas vere sekvi Jesuon Kriston.

Antaŭe kelkaj diris, ke Jesuo estis la unua komunisto, ĉar la unuaj kristanoj vivis en komunumoj kaj ĉiuj iliaj havaĵoj estis komunaj. Poste la kontraŭuloj levis sian flagon, kaj diris ke nur Kristo defendas kristanan okcidenton kontraŭ komunismo. Multaj pastoroj predikis pri la revolucio de la popoloj, kaj ili diris ke mem Jesuo gvidas ĝin. Aŭ: Kristo estas la princo de la paco, homoj venu al ni, ĉar nian pacbatalon gvidas Kristo. Do estas multaj flagoj kaj ni devas vidi malantaŭ ilin.

Ankaŭ en la eklezio estas komplika situacio. Ankaŭ tie oni flirtigas multajn flagojn dirante, ke tiu ĉi estas la afero de Kristo, venu tien ĉi! Ekzemple du grandaj eklezioj, la rom- kaj grekkatolika diras, ke nur monaĥoj kaj monaĥinoj sekvas vere Jesuon. La asketa, virga vivmaniero estus la ideala, ĉiuj tiel devus sekvi Kriston. En la alia flanko estas la jehovistoj, kiuj diras ke ĉiuj devus esti jehovisto, ĉar baldaŭ Li revenos kaj per la gvidado de Jesuo-reĝo estos terura mortigado de ĉiuj kiuj ne fariĝis jehovisto.

Tiom da programoj, tiom da flagoj

kaj sur ĉiuj estas skribita "Kristo". Oni devas vidi malantaŭ ilin kaj devas serĉi la gvidadon de la Biblio – kiel oni sekvu Jesuon.

Mi asertas, ke ni eĉ duoble devas turni nin al Jesuo Kristo. Kiam homo konvertiĝis, tiam li konvertiĝis al *grupo,* kiu menciadas la nomon de Kristo. Tio ne sufiĉas. Ĉiuj eklezioj predikas, faras mision, anoncas Kriston kaj tiu, kiu konvertiĝas, aliĝas al tiu grupo, kiu kolektiĝis en la nomo de Kristo, kaj ili ĉiuj akceptas la dogmatikon de tiu grupo. En tiu dogmatiko povas esti multaj belaj, puraj Kristo-elementoj, do la homo ne iris al malbona direkto, kiu faris tiun paŝon.

Sed bezonas ankaŭ dua konvertiĝo. El la *Kristo-instruado* de tiu grupo poste venas la persona turniĝo, renkontiĝo kun la *vivanta Jesuo Kristo*. Tio iomete levas la homon el la grupo kaj iom ankaŭ kontraŭstarigas lin kontraŭ la grupo. Tiam komenciĝas la krizo de la grupo: ĉu ili *eltenas* inter la membroj tiun, kiu kreskis inter ili, kaj poste renkontiĝis kun la vivanta Kristo kaj atingis ion pli, ion alian. Tie ĉi ekzameniĝas la kristanaj grupoj: ĉu ili povas elteni? Poste Kristo reen-donacas al la komumuno tiun membron, kun kiu Li kreis pli altnivelan kontakton. Al multaj malnovaj kristanoj daŭre estas aktuala tiu ĉi dua konvertiĝo. Do la sekvo de Jesuo okazas en du paŝoj: unue iu renkontiĝas kun grupo, komunumo kiu anoncas Kriston, kaj akceptas la kredon de tiu ĉi grupo. Longe eblas tiel vivi, sed per la dua paŝo oni devas daŭrigi la vojon.

Mia sekvonta penso estas, ke la sana sekvado de Kristo estas, ke la homo havas personan kaj plenan Kristo-travivaĵon, Kristo-konon. Tiuj, kiuj faris nur la unuan konvertiĝon, ili havas nur mozaik-Kriston. Ili prenas, ili kolektas la mozaik-kubojn de unuopaj predikoj, unuopaj versikloj. Ne sufiĉas, se vi havas bildon pri Kristo farita nur per tiuj eroj. Paŭlo sur la damaska vojo dum unu momento travivis la tutan Kriston, tiel, ke post dum sia tuta vivo li klarigis sian travivaĵon de tiu ununura momento en tezoj, en versikloj, en leteroj. Ni ĉiuj devas atingi iam Kristo-travivaĵon, en kiu akomodiĝas nia tuta vivo. Kaj tiam ni ne plu pensados pri tio, ke hieraŭ mi legis pri la dura Kristo, hodiaŭ mi legis pri la mola Kristo, hieraŭ mi legis, ke Kristo fastis, hodiaŭ mi legis ke Kristo iris al la nupta festo. Do kio estas la "vera" Kristo? Tiu, kiu faras faston aŭ tiu, kiu havas grandan apetiton? Se ni vere travivis Kriston, tiam tiuj bibliaj versikloj bele akomodiĝas en *unu* Kristo-bildon.

Do tio estas mia dua diraĵo: ni devas klopodi ekhavi, atingi unuecan Kristo-vizion. En la sekvo mi rakontos ion pri tiu unueca Kristo-vidado, kiu varmigas mian koron ĉiame.

Unue mi kontraŭas mian vizion kun Johano la Baptisto. Se mi pensas pri li, tiam li aperas antaŭ mi kiel severa profeto, kiu akre diras plendojn kaj minacas per fajro, per fino de mondo. Tiel li parolas pri la alproksimiĝanta Mesio, ke estas hakilego kaj ŝovelilo en liaj manoj, ĉar venos grandioza verdikto. Johano la Baptisto terure serioze agas por la afero de Dio, kaj tiu afero faras lin morna, severa, minaca.

Kontraŭe mi sentas, ke Jesuo estas ĉarma viro. Li estas la majstro de la jeso pri la vivo, kaj ne la negado de la vivo. Tiel mi ricevis Jesuon kaj tiel mi pluen donas: Li pro tio venis, ke ni havu vivon kaj ke ni riĉiĝu. Tiu kumrana sekto, kies tekstojn en iliaj grotoj scienculoj ne tro longe antaŭe trovis, sentis sin kiel armeo de Dio. Pluraj aliaj judaj religiaj grupoj uzis militan, batalan parolmanieron. Kaj samtempe Jesuo nomis siajn sekvulojn, siajn amikojn, nuptafestajn gastojn. Kiam oni demandis: kial vi ne fastas? Jesuo respondis: Kial fastu la nuptafesta gastaro, kiam estas tie la fianĉo? Ni ĝuu la belecon de la floroj, ankaŭ en malgranda, griza birdeto ni vidu la amon de Dio. Jesuo instruas nin rigardadi, ĝoji, vidi la veraĵojn kaj esplori la profundecojn sub la surfaco.

Mia tria penso estas: Jesuo estis humana. Estas terure, ke religioj povas formi la homojn esti nehumanaj. Tiam, kaj ekde tiam, eblis fari ŝtiparojn, bruligi homojn, fari inkvizicion, torturi homojn en la nomo de religio. Jesuo mirakle humana estis. Atentu pri tiu ĉi kompara serio: Jesuo estis amiko de homoj – Jesuo estis amiko de ordinaraj homoj – Jesuo estis amiko de kulpantaj homoj. La faliĝantan virinon, la impostiston, la kulpulojn li invitis: *venu kaj ricevu la amon de Dio*.

Kaj fine: laŭ mia kredo Jesuo estis la filo de Dio. Li estis plena de Dia esenco, do per amo. Li estas filo de Dio, ĉar li tiel multe amis, ke li eĉ ne protektis sian propran vivon.

La penso de la versiklo/Biblio estas, ke la sekvado de Jesuo estas aktiva stato. La sekvado de Jesuo signifas ’exoduson’, do eliron el la agrablaj okupoj, el la mola, varma nesto. Jesuo estis en ĉiama movo, irado-venado, kaj dumtempe li ne havis lokon, kie li estus povinta kuŝigi sian kapon. La homo instinkte amas la molajn, varmajn nestojn ankaŭ fizike, en la formo de ĉarma, varma hejmo. Kiel bone al judoj, ke ili povas kuŝigi siajn kapojn en la sinon de Moseo, kaj povas ripozi en Moseo. Sed Jesuo ne povis ien kuŝigi sian kapon, nek fizike, nek spirite. Al Li ne sufiĉis Moseo aŭ Elija. Jesuo havis “nur” la Patron.

Kiam mi pensadis pri tio, ankaŭ mi travivis, ke mia persona Jesuo-sekvado inter alie montriĝas en tio, ke mi ne havas, kie kuŝigi mian kapon. Estus kompreneble la bona, maljuna Johano Kalvino. Kalvino estas mia bona majstro, multajn belajn frazojn li diris, sed mi devas honeste konfesi, ke mi ne havas lokon, kie kuŝigi mian kapon, ankaŭ ne en la sinon de Kalvino. Sed mi havas ankaŭ alian travivaĵon. Antaŭ unu jaro mia sanstato alvenis al sufiĉe kriza situacio, minacis min tre serioza operacio. Mi estis en la hospitalo kaj tiam eksonoris en mi mem la kanto: “En la sinon de Jesuo sekure mi kuŝigas mian kapon”. Jesuo ne havis, kie kuŝigi sian kapon, sed ni havas, ni povas kuŝigi nian kapon en la sino de Jesuo. Vere estas tiel, kaj *ne ekzistas alia*! Sekvi Jesuon signifas, ke mi estas en aktiva stato, ne estas stabila, certa sistemo, eĉ ne estas religia sistemo al kiu mi povus definitive alveni. Ĉiama serĉado de vojo, serĉado de la aktuala veraĵo, ekzameno de la valideco de la hieraŭaj veraĵoj; sekvado

de Jesuo signifas *decidojn*. Ĉiuj kristanoj povas ataki min, ke mi iras al malbona direkto, ke mi erarvagas, ke mi estas herezulo. Nur tiun internan ĝojon mi povas havi, ke ĉiutage mi povas kuŝigi mian kapon en la sino de Jesuo, mi povas interparoli kun Li. Mi ricevas de Li kuraĝigon serĉi vojon, akcepti riskojn. Eble tiu homo sekvas plej multe Jesuon, kiu estas la plej multe atakebla, kaj eble tiu homo estas plej fore de Jesuo, kiu plej "neatakeble" sekvas Lin. Tiel stranga estas la situacio. Kiu ne komprenas tion, scias nur tre malmulte pri tio, ke ni havas vivantan Sinjoron. Ni ne respektas balzamigitan Kriston, sed ni volas en Lia spirito fari nian hodiaŭan laboron, kaj trovi nian vojon en la hodiaŭa ĥaoso.

Nur tiel eblas sekvi Jesuon, se mi amas la *hodiaŭan* mondon, se mi konas la problemojn de la hodiaŭa mondo. Ekzemple tion, ke mi vivas en manipulita homaro, kaj en tiu monda manipulado mortas la individuo. Se mortas la individuo, tiam sekvado de Jesuo certe signifas, ke ni helpas vivi la individuon, ke floriĝu la personeco. Se ni rigardas tion, kiel la tekniko mortigas la spiriton, tiam la sekvado de Kristo verŝajne signifas, ke mi estos libera de la logo de la tekniko. Ne estas la vero, ke tio farigas min homo, se mi havas pli grandan aŭton kaj ripozdomon. Se estas tiel, tiam sekvi Jesuon signifas ankaŭ tion, ke ni devas doni honoron al malriĉeco. Hodiaŭ tiu havas honoron, kiu havas monon kaj potencon. Sekvi Jesuon signifas kuraĝe kontraŭstari tion kaj doni honoron al simpla, malriĉa homo. Sekvi Jesuon estas sociala ago, ne estas nur religia afero. Ni komprenu, ke sekvado de Jesuo ne signifas ion pian, dignan aferon, kiun ni plej bone faru en malheleta preĝejo, sed signifas travivi en la homa socio la dian donacon, kiun Jesuo kunportis al ni, kaj pro tio ni devas koni ankaŭ la mondon.

En kvar densaj punktoj mi diras mian konkretan konfeson pri la sekvado de Jesuo.

Sekvi Jesuon signifas: *esti kune.* Mi ankaŭ persone devas serĉi kontakton kun Li, sed nur tiel eblas, se mi aliĝas en komunumon. Tiun nuptafestan, feliĉan kunestadon ni devas praktiki. La komunumo estas signifoplena. Esti kune, sed ne en la malmildeco de Johano de Baptisto, sed en la gajeco, la viv-jesado de Jesuo, helpante unu al la alia.

*Pensadi*. Sekvi Jesuon signifas pensadi, serĉi la veraĵon, akcepti la vivformon, ke mi ne havas kie kuŝigi mian kapon, ne estas sekura sistemo, dogmatiko, sur kies kusenon mi povus kuŝigi mian kapon.

*Helpi* al la mizeruloj. Sekvi Jesuon ankaŭ signifas diakonion, amservadon, en tiu ĉi ordo: devas ami la homon, devas ami la ordinaran homon, devas ami la kulpantan homon.

Kaj fine devas *riski*, kaj se bezonas: *suferi*. Ankaŭ tio apartenas al la sekvado de Jesuo: "*Se iu deziras veni post mi, tiu negu sin mem, eklevu sian krucon, kaj sekvu min*" (Mateo 16, 24).

Mi kunportis kelkajn simplajn, ĉarmajn, instruajn ekzemplojn, ke ne nur teorie, sed ankaŭ praktike ni vidu.

La unua ekzemplo reengvidas nin al la tempo de la romiaj cezaroj. Unu aroganta cezaro, kiu persekutis kristanojn, iam vokis kristanon kaj mokante demandis lin: Do, via fama ĉarpentisto, kion li faras nun? La homo silente respondis: "Ĵus nun li ĉarpentas ĉerkon al tiranoj". Tio sentima, libera spritaĵo estas unu karakterizaĵo de sekvado de Jesuo.

La dua ekzemplo estas el la tempo de la reformacio. Angloj havis grandan martiran predikiston, Hugh Latimer. Li estis mirakla homo! Li naskiĝis kiel kampulo kaj fariĝis episkopo. Li predikis en la korto de Henriko la 8a. Post unu el liaj kuraĝaj predikoj Henriko la 8a tre koleriĝis pri li kaj ordonis lin, ke sekvontdimanĉe denove li prediku kaj petu pardonon de la reĝo. Alvenis la sekvonta dimanĉo, kaj Latimer staris antaŭ la korta komunumo kaj tiel komencis sian predikon: "Vi, Hugh Latimer, bone pripensu, antaŭ kiu vi predikas! Vi predikas antaŭ la reĝo kaj li povas mortpuni vin. Sed ankaŭ tion vi pripensu, kiu sendis vin prediki. Dio sendis vin prediki, kaj Li povas damni vin. Do vi, Hugh Latimer bone pripensu, ke antaŭ Dio vi devos respondeci pri tiu ĉi prediko." Kaj poste li ankoraŭ unufoje, laŭvorte diris la predikon, kiun li predikis la antaŭan dimanĉon. La sorto de tiu brava kampulo estis la ŝtiparo. La reĝino Maria Tudor mortpunis lin kune kun du liaj kunuloj. Kiam oni kunportis la torĉon ekfajrigi la ŝtiparon, Latimer kriis al la du kunuloj: "Miaj fratoj! Tian lumon ni fajras tie ĉi hodiaŭ, kiun neniam plu eblos blovestingi en Anglio!" Kiu frapis min en tiu ĉi historio, estas ke Latimer estis aktiva. Venis la homoj fajrigi la ŝtiparon, sed per sia kredo li sentis, ke li mem, Hugh Latimer lumigas Anglion. Tio estas la sekvado de Kristo, ke eĉ en tiaj situacioj oni povas vivi aktive. Tion Latimer lernis de Jesuo mem. Kiam oni ŝnurigis Jesuon, Li diris: "Neniu forprenas ĝin (la vivon) de mi, sed mi mem ĝin donas libervole" (Johano 10,18). Tiun aktivecon neniu povas forpreni de homoj.

Mia lasta ekzemplo okazis en la jaro 1900. La ĉinoj ekkoleris pri la politiko de la koloniigantaj angloj, en kiu ankaŭ la eklezio partoprenis. Ekfajris ribelo, kaj ĉinoj mortigis milojn da kristanaj misiistoj kaj kredantoj. Tiam okazis, ke unu ĉino eniris en misian domon, kie unu misiisto provis kaŝi sin kaj diris al li: Venu kun mi, mi savas vin, ankaŭ mi kredas en la nomo de Kristo. Baldaŭ alvenos tien ĉi la malamantaj homoj kaj ili mortigos vin." La misiisto iris kun li, ili kaŝis sin kaj dum longa tempo ili estis kune. Kiam jam finis la minaco, demandis la misiisto la ĉinon: "Ĉu vi vere kredas en Jesuo Kristo?" La ĉino respondis: "Mi ne kredas, sed mi sciis, ke vi ne fidus en mi, se mi tion ne dirus". Ĉu vi komprenas la historion? Laŭ mia kredo la ĉino malgraŭ sia konfeso, sekvis Jesuon, ĉar li *amis* la persekutitan homon. Li ne kredis "oficiale" en Kristo, ĉar li ne povis akcepti kion la angloj faris en la nomo de Kristo. Sed la Spirito de Kristo estis en li, kiam li savis la vivon de la misiisto. Jesuo havas ankaŭ "aliajn ŝafojn", ni akceptu tion: ankaŭ aliaj sekvas Lin. Multaj preteriros nin. Ni

honte vidos, ke tiu, kiu diris, ke li ne kredas en Kristo, eble en tiu homo estas multe pli da Spirito de Kristo, Spirito de homsavado, helpado, bonvolo, ol estas en ni. Ni ĝoju ke pli multaj sekvas Jesuon, ol tiuj, kiujn ni vidas. Mi deziras, ke ankaŭ la "oficialaj" kristanoj vere sekvus Lin!

Mia fina sumigado: sekvi Jesuon signifas la viv-formon de la amo, signifas la trans-prenon de "la vivo estas pli" (Mateo 6, 25), kio aperis en Kristo, kaj la disdono de "la vivo estas pli" inter la homoj.

Vi pripensu la sekvontajn:

1. Simpligu vian animan vivon al la sekvado de Jesuo Kristo! Ne blokiĝu ĉe dogmoj, teoriaj problemoj, kvereloj inter eklezioj. Vi klopodu fari unuecan, tutan bildon pri Kristo en via animo, kiu tiel estas Filo de Dio, ke Li estas amiko kaj kuracisto de kulpantoj, mizeruloj. Tiam vi komencos vere koni Kriston, kiam viaj hontoj ne baras vin de Li, sed gvidas vin al Li, sciante, ke li pli bone komprenas vin ol iu ajn.
2. Kiu sekvas Jesuon Kriston, tiu estas interesiĝema, povas lerni. Lia spirito estas elasta, povas fari kuraĝajn decidojn kaj akcepti riskon, serĉas novajn vojojn kaj estas preta humile servi. Ne serĉas la agrablan varmeton de molaj nestoj, la komforton de malnovaj sistemoj, la sekurecon de senriska vivo. Se vi vere komencas sekvi Jesuon, via vivo juniĝos al bela eterna vivo.
3. Vi povas sekvi Jesuon nur tiel, ke vi kune pilgrimas kun komunumo de Liaj disĉiploj. Ni ĉiuj devas havi personan rilaton kun Li, sed samtempe estas liaj vortoj: "*Ĉar kie du aŭ tri estas kune en mia nomo, tie en ilia mezo estas ankaŭ mi.*" (Mateo 18, 20)

El la kristana grupo oni devas atingi personajn Krist-travivaĵojn, sed tiuj personaj travivaĵoj reengvidas nin al la kristana grupo, komumuno, amika kunestado.

ଓ



Reviviĝo (1499-1502). Raffaello Sanzio (1483-1520)

## Agadoj de fondaĵo 'Zienderogen' en 2020

El Fenikso 2/2021. Por pliaj informoj vizitu: www.stichtingzienderogen.nl

La redakcio ricevis novaĵleteron de fondaĵo Zienderogen pri ties agado en la jaro 2020. La fondaĵo havas historian ligon kun Esperanto, ĉar ĝia fondinto Jacques Tuinder estis esperantisto. La organizo ebligas, helpe de monaj, materiaj kaj homfortaj donacoj, aliron por loĝantoj de ekonomie malpli fortaj landoj, al okulvitroj, medikamentoj kaj helpiloj por vidhandikapitoj. Tiamaniere la fondaĵo strebas preventi nenecesan blindecon.

La kontaktoj kun la landoj, kie oni aktivas, pasintece okazis en Esperanto, tiam sub la nomo 'Evidente'. Tiu nomo trifoje entenas la literon 'e' memorigante pri la komenca nomo 'E3' – esperantistoj esperigas esperantojn.

Kion la fondaĵo 'Zienderogen' atingis en 2020? Pro la kronviruso la ebloj estis limigitaj, La fondaĵo starigis kunlaboron kun pli grandaj organizoj. Komence de la jaro okazis misioj en Sud-Afriko kaj la indonezia insulo Ambono. Planitaj vojaĝoj al pluraj aliaj landoj ne povis okazi pro la kronvirusaj limigoj ĉar misio ĝenerale okazas kunlabore kun lokaj medicinistoj kaj helpantoj: liverado de medikamentoj kaj bezonaĵoj por okulekzamenoj kaj operacioj, kaj aliaj helpiloj. Oni faras mezuradojn por okulvitroj.

*Elise Lauwen*

## Jarraporto 2020 de fondaĵo "Evidente"

La ĉi-jara raporto povas esti iom mallonga: Kovim-19 profunde skuis la mondon. Antaŭa normalaĵo nun absolute malas. Mankas al ni interalie persona kontakto: se antaŭa jaro ni kutimis saluti kiskiskise, ni nun intertuŝetas kubute. Malplej eble ni intervidiĝas, antaŭe kaptinte ajnan okazon. La Kristnasko estis destinita al parencoj, amikoj. Nun ni gastigas etope. Tio ŝajnas granda sufero. Tamen konsidere la celgrupon de 'Evidente' ni eĉ bonŝancas.

llin, en malpli prosperaj landoj, premas pli peza sorto manke de registaraj subtenprogramoj. Ni do kalkulu niajn kristnaskajn benojn, kaj rigardu antaŭen al 2021, espere pli normala jaro. Kiam Eŭropo fartos pli bone, ankaŭ Evidente povos reaktivi, laŭ nia kompetento havigi pli bonan vidon al homoj: per pli bona vido, pli bonan estontecon!

En la antaŭa Novaĵletero legeblis ĉio, kion ni ja povis fari: ja aperas lumeto. Dank' al niaj sponsoroj kaj ŝparujspilantoj ni konstruis belan rezervon: sekve ni povos aliri pli ampleksajn projektojn. En la tagordo ja aperas nur skizoj, tamen espere plenumotaj senskrape. Ni ne plene inertis, sed serĉis kunlaboradon kun pli grandaj organizaĵoj. La multa lobiado kaj interparolado nun espere fruktos. 'Eye Care Foundation' (Okulzorga Fondaĵo) interesiĝis kaj demandis ĉu ni pretas kunlabori en kelkaj projektoj. Precipe per okulmezurado nia fondaĵo povas 'aldoni valoron'. Kaj eble ni povos investi en pli longdaŭraj projektoj. Ĉu iom optimiste? Almenaŭ laŭ mia delonga deziro. Ni ankoraŭ ne antaŭvidas konkretan mision, sed ja esperas baldaŭan oportunon. Mi volas esprimi dankon al ĉiu kiu fervore favoris nian agadon, sponsorante, donacante aĵon kaj helpon al libervolan kontribuon de misiano aŭ estrarano. ...

Nome de la Plenestraro: *Robert Bus, Daan Simons, Ella Blom* kaj *Linda Lokhorst, George de Jong* (prezidanto)



# Pavla Klimešová

La 15-an de marto 2021 mortis en České Budějovice en la aĝo de 69 jaroj fratino Ph Dr. Pavla Klimešová, edzino de ĉeĥa pastoro Pavel Klimeš. Ŝi estis psiĥologino en privata konsultejo.

Funebra diservo okazis sabate la 27. 3. 2021 en loka preĝejo kaj partoprenis ĝin 15 personoj surloke kaj pli ol 80 rete.

Trankvilan ripozon al fratino Pavla kaj
sinceran kompaton al frato Pavel deziras kelianoj.





Fotoj el arkivo de P. Klimeš

# Informe

UEAviva
2 330 prenumeranter

## Panelo "KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?"

Okaze de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK), UEAviva, la kanalo de UEA ĉe YouTube, elsendis la 13an de marto la panelon "KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?". Dum la panelo la esperantistoj kaj sciencistoj José Antonio Vergara, Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Amri Wandel diskutis pri la pandemio kaj ĝia influo en nia tutmonda socio, de la scienca kaj persona vidpunkto.

INK estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj aŭspiciata de UEA. La lanĉo de INK okazis la 20an de septembro 2020, dum la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto.

Spektu la elsendon ĉe: https://tinyurl.com/7pnae48s
aŭ ĉe: https://tinyurl.com/2rnnzmrn

# Ne gapu sor! Nin ĉeas la Sinjor'

SCHAUT NICHT HINAUF, DER HERR IST HIER BEI UNS




SCHAUT NICHT HINAUF, DER HERR IST HIER BEI UNS • Effata (1) 137 • M kaj germana T: Lutz Hoffmann, Franz Mausberg, Karl Norres, Leo Schuhen • © EDITION WERRY; Mülheim an der Ruhr • E: Albrecht Kronenberger 2021-02-25

https://tinyurl.com/yj8m8rww

Ago 1,11